

P A C O k a j J U S T E C O

Feb 46

Orgaan der E° beweging - BRUGGE.

Prezidanto : Drs F. ROOSE, J. & M. Sabbestraat, 12, Brugge.  
 Sekretariejo : ROOSE-DE KERSGIETER, J. & M. Sabbestr. 12, Brugge.  
 Propagando : MAERTENS Gr., Nieuwstraat, 54, Assebroek.  
 Poŝtkonto : 291429, Maertens Gr., Assebroek.

((( )))

El "Amerika Esperantisto" Dr. Wilhelm Solzbacher.

DUMBARTON OAKS EN DE TOREN VAN BABEL.

Wanneer president Roosevelt en Premier Churchill Maarschalk Stalin of generalissimus Chiang Kai-Shek ontmoeten, dan kunnen deze leiders van de Vereenigde Naties niet direkt met mekaar spreken alhoewel wel ieder van hen in een zekere maat een taalkundige is. President Roosevelt en eerste Minister Churchill spreken zeer goed Fransch en hebben een zekere kennis van verschillende andere talen. Maarschalk Stalin, waarvan de moedertaal het Georgisch is (hetgeen even zoozeer verschilt van het Russisch als het verschilt van het Engelsch) verstaat vier of vijf van de talen die in de Sovjet-Unie gesproken worden. Generalissimus, die in Tokio gestudeerd heeft, kent Japans. De vier te zamen zijn waarschijnlijk in de mogelijkheid 15 of 16 talen te spreken of te verstaan maar zij hebben geen gemeenzame taal. Moesten deze vier samen komen (hetgeen tot nog toe niet gebeurd is), dan zou ieder woord in drie verschillende talen moeten gesproken worden hoe sterk zij ook mogen gelooven in één wereld. Men mag gerust aannemen dat alleen de beste vertalers in dienst genomen worden wanneer de leiders der Vereenigde Naties mekaar ontmoeten en dat bijgevolg misverstanden, te wijten aan fautieve vertalingen, aldus tot een minimum herleid zijn. Zij worden echter nooit volledig geweerd. Wanneer de sluiers der geheimzinnigheid, die belangrijke konferentie's omgeeft, zal opgeheven zijn, zullen wij zeker geschiedenisjes hooren gelijkend aan deze welke verteld werden over de talenhandicap op de Vredesconferentie van Versailles.

Ik wil in geen deele beweren dat taalmoeilijkheden de voornaamste hinderpaal vormen voor betere internationale relatie's, of dat zij even belangrijk zijn als ideologische en politieke verschillen. Maar wanneer onderhandelingen een onzeker karakter hebben, wanneer de atmosfeer gespannen is, wanneer er bewust of onbewust een groot deel wederzijdsch wantrouwen is, dan wordt dat alles nog slechter en ingewikkelder door onjuiste vertalingen en taalmisverstanden die kunnen oprijzen.

Daar het glad onmogelijk is in internationaal leven vele talen terzelfdertijd te gebruiken, is er een tendenz geweest om sommige talen, bijvoorbeeld Engelsch en Fransch, een monopolium te geven. De ondervinding heeft echter geleerd dat het gebruik dezer bevoorrechte talen vele problemen onopgelost laat zoodat aan meer en meer andere talen een half officieel karakter wordt gegeven totdat de zaken zoo ingewikkeld worden dat de vraag naar een wederzijdsche taal niet meer kan verzwegen worden. Onder dit op-

zicht verdient het voorbeeld van de Volkerenbond, het Internationaal Arbeidsbureau en het permanent hof van Internationale Justitie zorgvuldige overweging; vooral nu omdat de voorstellen van Dumbarton Oaks een wereldorganisatie suggereeren (genoemd : de Vereenigde Naties) die in essentie een type Volkerenbond is. Daar de voorstellen geen enkel woord reppen over het taalaspect der geplande collaboratie, mag verondersteld worden dat de zaken zullen verhandeld worden ongeveer zooals in de Volkerenbond. Daar zal wellicht één groot verschil zijn. In de Volkerenbond waren de twee officieele talen de nationale taal der domineerende machten, Groot Brittanië en Frankrijk. In de "Vereenigde Natie's" zal Rusland een zoodanige rol spelen dat het wel zal noodzakelijk zijn het Russisch bij de officieele talen te voegen. Het feit dat de studie van het Russisch onlangs verplichtend werd in alle secundaire scholen van Bulgarije en bevrijd Joegoslavië en dat een decreet van de Roemeensche regeering aan de schoolhoofden instructies gaf volgens dewelke klaslokalen moeten beschikbaar staan voor lessen in de Russische taal, schijnt er op te wijzen dat Rusland geïnteresseerd is in het bevorderen van studie en gebruik van zijn eigen taal buiten de grenzen.

De Volkerenbond, het Internationaal Arbeidsbureau en het Permanent Hof waren door de omstandigheden gedwongen een groot aantal talen te gebruiken bij het Fransch en het Engelsch. Artikel 39 van de statuten van het Permanent Hof (veranderd door het protocol van 14 Sept. 1929) zegt : "De officieele talen van het Hof zullen het Fransch en het Engelsch zijn. Als de partijen overeenkomen dat het geval in het Fransch zal behandeld worden dan zal het oordeel in het Fransch geschieden. Komen zij overeen dat de zaak in het Engelsch zal behandeld worden, dan zal het oordeel in het Engelsch geschieden. Bij ontstentenis van overeenkomst over de taal die zal gebruikt worden, mag iedere partij, in de pleidooien, de taal gebruiken die zij verkiest. Het besluit van het Hof zal in het Fransch en het Engelsch gegeven worden. In dit geval zal het Hof terzeldertijd bepalen welke van de twee teksten zal beschouwd worden als autoriteit hebbend. Het hof mag, naar verlangen van eene der partijen een andere taal dan Fransch of Engelsch, voor het gebruik toestaan.

De voorlaatste zinsnede aanvaardt impliciet dat foutieve en duistere vertalingen soms onvermijdelijk zijn met het tweetalensysteem, ook als geroutineerde internationale rechtskundigen de tekst opstellen. Veelvuldige bezoeken aan het Volkerenbondskretariaat, zoowel langs de hoofdingang als door het achterpoortje hebben me vertrouwd gemaakt met het taalkundig aspect van de activiteit van de Volkerenbond.

(wordt vervolgd)

-----  
MARKUS AURELIUS ANTONIUS. (121 - 180)  
-----

La imperiestro-filozofo. Unu de la familio de la Antonanoj. Kies regadon oni ofte nomas "la feliĉa imperio". Efektive la regado de tiu familio estis prosperiga por la Roma imperio. Tamen la vivo en Romo en tiu tempo ne montras belan bildon. La malmoraleco en ĉiuj klasoj de la societo estis terure granda. Legu nur "La Analoj" de Tacitus. Ni ne pensas ke tiu majstra verkisto trograndigis la faktojn. Kaj ne komprenu la vorton malmoraleco en la mallarĝa senco sed en la plej larĝa. En la vetkurego al ĝuo, al potenco, al honoro, ĉiu havas malamikegojn kaj neniun momenton oni estas certa pri la vivo. Tiel akra estas tiu luktego ke oni tutsimple ne plu pensas eĉ pri justeco, ordo, proksimulamo, k.t.p.



ĉie nur perforto, mortigo. Kaj en tiu brutaro, subite, kiel la nigra ŝafo en la truĝejo de blankaj ŝafoj en unu de la filmoj de Ch. Chaplin, aperas bona kaj pensanta homo. Kiel estas eble ke li sukcesis ĝis fino de vivo resti imperiestro ? Ŝajnas ke li ne estis feliĉa en hejma vivo. Edzino ne komptrenis lin. Li, kiu tute alie agis kaj tute alia estis ol la ceteraj imperiestroj. Lin sekvis lia filo Kommodus, same kruelega kiel la longa listo de bestoj imperiestroj. M.A.A. okupis sin pri emancipatio de la virinog ! kaj de la sklavoj. Kaj li penas por helpi malriĉulojn ! Kontraŭ la dezirego de la popolo (la plebo) li estas antipatia al glavobatalantoj kaj la glavobataloj en la cirkoj. Kaj tiu homo ege persekutis la Kristanojn ! Paradokso aŭ ŝajnparadokso ? Problemo ! Verŝajne li mem estas viktimo de la suspektigaj klaĉadoj pri la Kristanoj kiuj devis vivi kaj kunveni en sekreto. Tiel li igis mortigi homojn kiuj staris multe pli proksimaj al li ol liaj konsilantoj, familianoj, senatanoj kaj armeestroj.

Ni donas tie-ĉi sube kelkajn tradukitajn citaĵojn el lia notlibrotaglibro "Imperiestro Markus Aurelius Antoninus al si mem". "Se vi koleras al iu, imagu ke tiu homo estas morta, etendita en ĉerko...kaj vi pardonos".....

-Pri sinpripenco : "Oni serĉas loketojn kie oni povas solesti sur lando, al maro aŭ sur montoj. Tio estas stulta dezirego, ĉar, se vi volas, vi kapablas soliri en vi mem, ĉar nenie oni soliras tiel trankvila kaj senzorga kiel en propra animo, precipe tiu kiu portas en si tion en koi li trovas trankvilecon. Trankvileco, laŭ mia kompreno, estas nenio alia ol interna ordo".

-Pri toleremo : "Jam je tagiĝo vi devas pripensi : mi kontaktiĝos kun enmiksiĝemulo, maldankemulo, trompanto, egoisto, kalumnianto. Ke ili havas ĉiujn tiujn malvirtojn devenas de ilia nescio pri bono kaj malbono".....

Noto : tiu konvinko venas de Sokrates. Sokrates instruas ke la malbona ago ĉiam malutilos iamaniere al la faranto ĉar ĝi malbeligos tiun personon aŭ malindigos lin aŭ alie. Do se tiuj personoj bone vidus tion, ili neniam farus malbonajn agojn. Do temas pri tio : bone montri tion al ili".....

-Pri Patrujo kaj universo : "Por mi kiel Antoninus, Romo estas miaj urbo kaj patrujo. Por mi kiel homo ĝi estas la universo. Do tio kio estas utila por ambaŭ tiuj ŝtatoj, sole en tio konsistas mia bono."

Noto : tiu parolo memorigas al la parolo de la fama ĵus mortinta Hinda poeto Rabindranath Tagore : "mi estas preta por servi mian patrujon sed mia adoro estas sola por la justeco kiu estas multe pli vasta ol mia patrujo".

-Pri sincereco : "malinde kaj trompe estas diri : "mi intencas esti sincera je vi" Kion vi faras ? Ion tian vi ne devas antaŭe diri ! Tio ja evidentiĝos je la ĝusta momento. Tio devas vidiĝi sur via vizaĝo. Via vorto devas tuj elparoli tion. Ĵus kiel iu kiu amas tuj ĉion legas sur la vizaĝo de la amato. Kiu estas bona, simpla kaj amika, montras tion en la okuloj kaj ne kaŝas ĝin"....

-Pri vereco : "Se iu kapablas pruvi kaj konvinki min ke mi malbone pensas aŭ agas, mi dankeme akceptos ĉar mi serĉas la veron per kiu ankoraŭ neniu estis malutiligata. Sed tiu kiu persistas en propraj iluziigo kaj nescio, tiu malutilas al si mem".

-Pri malestimego : "Iu malestimas min ? Tio gravas nur al li. Gravas al mi zorgi ke neniu ion aŭdas aŭ vidas pri mi kio meritas tiun malestimegon. Li malamas min ? gravas al li. Sed mi estos bonvolema kaj bona por ĉiuj kaj preta por montri al li en kio li malbone agas".

sen-Pri evoluo : "ĉu iu timas ŝanĝigon ? Kio do povas efektiviĝi ŝanĝigo ? Kio estos al la esenco de la universo pli kara ol tiu ŝanĝigo kaj al kio ĝi pli kutimiĝis ? ĉu vi povas nutri vin se la nutraĵo ne ŝanĝiĝas ?

Apud mortolito : "Neniu estas tiel feliĉa ke neniu apud lia mortolito ĝojas pro la akcidentego kiu trafas lin. "Tiaĝa li estis kaj saĝa" Sed je lasta momento oni ja aŭdos iun diri duonvoĉe : "Tiu lernejestro nun finfine lasos vin trankvilaj !"

Drs. F. ROOSE.

=====  
=====

J U N E C O .

Juneco ne estas "periodo" de la vivo. Ĝi estas stato de animo. Ĝi estas naturo de la volo, kvalito de la imago, vigleco de la emocioj, venko de la kuraĝo sur la timemo, de la deziro al aventuroj sur la ŝato je facileco.

Neniu iĝas maljuna nur per la travivo de nombro da jaroj, oni iĝas maljuna nur per la perfido al siaj idealoj. Jaroj ensulkigas la haŭton sed la forlaso de entuziasmo ensulkigas la animon.

Tedo, dubo, sinmalfido, timo kaj malespero : jen ili estas la longaj, longaj jaroj kiuj klinigas la kapon kaj kiuj turnas la kreskantan spiriton ree al polvo.

Ĉu je sepdeka jaro, ĉu je deksesna, en ĉies koro estas la emo al mirindaĵoj, la dolĉa surpriziĝo pro la staloj kaj pro la stal-similaj aĵoj kaj pensoj, la kuraĝplena provoko de grandaj okazoj, la neerarebla infaneca emo al kio nun, kaj la ĝojo kaj la ludo de la vivo.

Vi estas tiel juna kiel via kredo, tiel maljuna kiel via dubo; tiel juna kiel via memfido, tiel maljuna kiel via timo; tiel juna kiel via espero, tiel maljuna kiel via malespero.

Tiel longtempe kiel via kora kapablas allasi mesaĝojn pri belo, aplaŭdo, kuraĝo, granda kaj povo de la tero, de la homo kaj de la senfino, tiel longtempe vi estas juna.

Kiam la kaptiloj ĉiuj estas malstreĉitaj kaj la tuta centra loko de via koro estas kovrita per la neĝo de pesimismo kaj la glacio de cinikismo, tiam vere vi iĝis maljuna kaj Dio kampatu vian animon.

el "The Reader's digest" Dec. 1945  
tradukis el la Angla - F.R.

(-)(-)(-)(-)(-)(-)(-)(-)(-)(-)(-)(-)(-)

PAGO DE LA ESPERANTO-MOVADO.

En tiu-ĉi kroniko ni volas regule priparoli okazintaĵojn aŭ publikigojn en la E° mondo kaj ankaŭ priparoli la situacion de nia movado, la pozicion de Esperanto, la cirkonstancojn kiuj favoras aŭ malfavoras al nia idealo. Tiun-ĉi fojon mi volas doni resumon de la lasta parolado kiun donas ĉiujare nia prezidanto je la fino de la ĝenerala jarkunveno de "Paco kaj Justeco" kaj en kiu li ankaŭ kutimas situi la E° movadon en la nuna tempo.

Do, laŭ nia prezidanto, du superstarantaj faktoj karakterizas la nunan momenton kaj estas ankoraŭ tria fakto kiu ne tiel superstaras sed kiu estas tamen ankaŭ tre karakteriza por la hodiaŭa tempo. La unua estas la industriigo de tre multaj landoj. Dum la lastaj 15 jaroj la industrio pligrandiĝis de 75 %. De tiuj procentoj la duono okazis en landoj kiuj antaŭe estis nur terkulturaj landoj. Landoj kiuj antaŭe tute ne estis konataj pro industrio, nun, kiel Turkujo, Rumanujo, Aŭstralio, produktas pli da ŝtalo ol ili iam antaŭe envenigis. Popoloj kiuj antaŭ + 20 jaroj estis nomadoj





nun post tiu milito venis plua stadio en tiu evoluo. Multaj emas nun konsideri la idealismon kiel ion danĝeran kaj la idealiston kiel danĝeran personon. Oni ne plu volas idealistojn. Kiel malproksimaj ni estas de la tempo en kiu oni estimegis la idealismon !

Kiel reagis la homoj je ĉio priskribita sub tiuj tri punktoj ?

Nu. La ne intelektulo, indiferece ! li konas nur faktojn. Estas la ĉiutagaj faktoj kiuj kontentigas kaj malkontentigas lin. La fakto ke li konstatas havi bonajn nutraĵojn kaj salajron. La fakto ke lia ŝtata partio malvenkas. Problemoj pri la signifo de ĉio tio ? pri la evoluo de ĉio tio ? pri la principoj kiuj estas je la bazo de ĉio tio ?...?? Kaj la intelektulo ? Mi jam diris sub 2. Plej dise plej malsimile, plej malorde, plej konfuze.

Kaj la junularo ?

Lau kelkaj la hodiaŭa junularo tute sinteziĝas en tiujavortoj : swing, zazou, plezuro, knabinoj, trinko kaj sporto. Ĉu do je iu periodo de la vivo, da junuloj ne plu estas sub la impresigo de sieĝantaj demandoj kiel : la celo kaj la signifo de la vivo; la valoro de vero kaj mensogo, de justo kaj maljusto, de ordo kaj malordo, k.t.p...., k.t.p..... Ni emas kredi ke la junularo efektive ankoraŭ devas lukti kun tiuj problemoj en iu momento de la vivo, sed ke tiu periodo tre rapide forpasas, kiel ĉio nuntempe rapide evoluas. Tiu periodo tre rapide forpasas kaj pro la grandega influo de la ekstermondo, ili baldaŭ adaptiĝas al tiu ekstera mondo, pensas kiel ĝi, agas kiel ĝi, perdiĝas kiel ĝi.

En tia mondo, ni venas kun nia Esperanto ?? Estas evidente ke en ĝi, idealoj ne havas ŝajnon de sukcesebleco. La amo ? ! vorto en la vento ! La interna ideo ? voĉo en la dezerto. Tio kion ni nun devas fari estas : praktike ekspluati. Montri per bonaj argumentoj, trafe formulitaj, kiel Esperanto utilas.

Sed interne de la E° grupoj devas regi tute alia spirito. Ĉiu E° grupo devas esti pli bela mondeto. En la grandega amaso de materialistoj ĉirkaŭvagas ie kaj ie iu nostalgia animo, kiu ne akordiĝas kun tiu mondo, iu sentema, noblanima koro kiu serĉas bonajn homojn. Ilin oni devas allogi al niaj E° grupoj. Fortikaj apogiloj de niaj movado kaj ideologio ili iĝos. Jen la tasko kaj la pozicio de la E° movado en la nuna tempo. . . .

Hazarde ni ricevis en mano la Junularan numeron de "Esperanto Internacia" kelkajn tagojn post tiu parolado. Konfirmon de la ĉi-supra vidpunkto ni trovis sur paĝo 2 kie M.S. skribas : "oni devas allasi ke la vivo....fariĝis pli kaj pli materialisma. En la nuna tempo oni povas diri, bedaŭrinde, la homoj tendencas ĵuĝi aferojn laŭ pure materialaj valoroj. .Do, vole nevole ni devas propagandi Esperanton en tiu sama mondo.

La tiel nomitaj "praktikaj" homoj ne necese estas homoj sen idealoj...kaj niaj praktikaj samideanoj fundamente estas, bonvolu kredi, ankoraŭ sam-ide-anoj".

x x x x x x x x

Estas vere mirinde per kia rapideco la E° movado restariĝas en Nederlando, la lando tre kruele frapita kiu sangas ankoraŭ el multaj vundoj. La "Federacio" denove plene laboras. L.E.E.N. rekomenas. La nova E.M.O. venas de tie. Ankaŭ la "Universala Ligo". Ni ĝus ricevis unuan postmilitan numeron de "Espero Katolika" kun tute antaŭmilita aspekto. Kiam eble baldaŭ reaperos "Heroldo" estos verŝajne ankaŭ el tiu lando. Kvankam ne ĉiuj iniciatantoj estas Nederlandanoj, tamen ĝi estas pruvo pri la morala forteco de la Nederlanda popolo.

- - - - -